

POIA ESPERANTISTO

1 • januaro-februaro • 1971

Zł 6.—

La 26 datreveno de la liberigo de Varsovio (1945—1971)

La monumento „Nike” sur la Teatra Placo en Varsovio (Al la herooj de Varsovio 1939—1945; la verko de M. Konieczny — starigita en 1964 j.)




Semajno de Internacia Amikeco

Semajno de Internacia Amikeco (SIA) donas al ni esperantistoj eblon kunlabori kun aliaj homoj en la socioj por celo, kiun ili ordinare volonte akceptas kaj aprobas. Tiu celo krome estas la baza ideo de la Internacia Lingvo — amikeco trans limoj. Kunlaborante kun aŭtoritatuloj kaj organizaĵoj en ĝusta maniero pri SIA ni elpaŝas el niaj ofte tro sektecaj enfermejoj, montras, ke ni vivas kaj faras nian lingvon kaj movadon konataj. Kompreneble SIA ne anstataŭos aliajn rimedojn informi pri nia lingvo, kiel ekz. gazetartikoloj, prelegoj, afiŝoj, flugfolioj, anoncoj ktp. Sed SIA kaj la kunlaboro pri ĝi estas valora suplemento en la informado kaj poresperanta laboro. „Nur intensa utiligado de ĉiuj eblecoj paralele efikas pozitive”. (La Principaro de Frostovallen.) En Svedujo ni faris kelkajn erarojn en nia laboro por SIA, kiujn mi volas menci, por ke oni evitu ilin en aliaj landoj. Ni presigis afiŝojn en la formato A4 kaj sendis al butikistoj (kiel florvendejoj, librovendejoj kaj aliaj). Unu jaron ni sendis rekte, kio kostis al ni kaj monon por afranko kaj tempon. Alian jaron ni sendis la afiŝojn pere de komercistaj organizaĵoj. Ambaŭ metodoj estis malbonaj, ĉar la butikistoj ordinare ne aperigis la afiŝon, eĉ ne kiam ĝi venis pere de ilia propra organizaĵo. Pli bona estis la rezulto, kiam unu aŭ du esperantistoj vizitis la butikojn kaj parolis kun la posedanto aŭ la komizoj.

AGADO DE LOKAJ GRUPOJ

Permesu al mi prezenti alian labormanieron, kiu cetere jam estas uzata en kelkaj landoj. Vidu, kion skribis „Antverpenano” en la maja numero de la revuo „Esperanto”, p. 80. Bone



Amikeco trans limoj

agis niaj geamikoj en Antverpeno, same kiel en Bulgarujo. La programo, kiun mi tie ĉi prezentas, koncernas ĉefe la lokajn Esperantajn societojn, t.e. grupojn, ĉar ili estas la vera forto de la movado pro siaj taskoj: informado, kursoj, edukado de esperantistoj en internacia medio, lingva perfektigo. Jen do propono pri agadprogramo por la lokaj Esperantaj societoj (grupoj):

1. La societo aŭ grupo elektas SIA-komitaton inter siaj membroj, kiu konsistas el ekz. nur tri aktivaj personoj, kiuj bone povas reprezenti la societon.

2. Tiu malgranda komitato pligrandigas sin mem en maniero: Oni vizitas eminentulojn de la urbo, gvidantojn de gravaj organizaĵoj aŭ kaj entreprenoj. Antaŭ ili oni prezentas la ideon de SIA, kaj poste petas ilin, ke ili proponu aŭ elektu membrojn al la jam ekzistanta SIA-komitato.

Rekomendinde estas ankaŭ havi honorajn, t.e. ne laborantajn membrojn de la komitato. Kiel honorajn membrojn oni nur elektu verajn eminentulojn, kiuj estas konataj kaj per sia nomo povas apogi la aferon antaŭ la publiko.

Kompreneble oni unue devas demandi, ĉu la proponitoj aŭ elektitoj akceptas esti membroj de la loka SIA-komitato.

(fragmentoj el „Esperanto — Revuo Internacia” nr-o 10)

Al ĉiuj, kiuj bonvolis sendi al ni bondezirojn okaze de la Festoj kaj Nova Jaro — ni kore dankas pro la memoro.

Al la Novaj Legantoj ni ripetas niajn bondezirojn el la 6 numero de „Pola Esperantisto” — la dezirojn de persona prospero, por Ili kaj por Iliaj proksimuloj, kaj de plua utila agado favore al nia Movado en la komenciĝinta 1971 jaro.

REDAKCIO

PS. Ĉeokaze ni petas la Legantojn partopreni la realigatan kampanjon de kristaligo de la profilo de la gazeto, pere de alsendado de siaj rimarkoj.

R.

La plenkunsido de la Ĉefa Estraro de PEA

La 22-an de novembro 1970 okazis plenkunsido de la Ĉefa Estraro de la Pola Esperanto-Asocio. La kunsidon partoprenis ankaŭ reprezentantoj de la filioj de PEA el ĉiuj vojevodaj urboj.

La ĉefa temo de la kunsido estis organizaj ŝanĝoj en la Asocio, surbaze de la nova statuto kaj laborplano por la jaro 1971.

Raporton pri la agado de la Ĉefa Estraro dum la 5 lastaj monatoj prezentis la prezidanto de la Asocio, s-ano Lech Kosieniak.

Dum la diskuto pri la raporto s-ano Kazimierz Małycha el Bydgoszcz substrekis, ke ĝuste nun alvenis la tempo, pri kiu Zamenhof parolis dum la dua Universala Kongreso, ke Esperanto ĉesis esti ideo kaj estiĝas lingvo.

Sekve la plenkunsido priparolis la novan statuton de la Asocio kaj projektojn de diversaj regularoj, bezonaj por ordigi la organizajn aferojn de la Asocio, laŭ la nova statuto. Post vigla diskuto oni akceptis 11 regularojn kaj decidojn, kaj inter aliaj: regularon de la Esperanto-rondo, regularon de la fakaj sekcioj de PEA, regularon de la komisionoj kreataj de diversgradaj estraroj, pri la vojevodaj kunvenoj en la unua kvarono de la 1971 jaro.

Diskutante pri la programo de la agado por la 1971 jaro la Ĉefa Estraro esprimis instigon al ĉiuj organizaĵoj de PEA, ke ili diskutu pri la bezono de diversforma laboro en la klubejoj, substrekante ĉefe disvolvadon de laboro de la fakaj rondetoj. Oni menciis interalie, ke la Vroclavia Filio de PEA intencas organizi modelan Esperanto-Klubon. Sekve oni diskutis pri la enhavo de „Pola Esperantisto” kaj pri dezirinda eldono de verkoj de la pola beletro.

La plenkunsido de la Ĉefa Estraro akceptis la programon de la agado de la Pola Esperanto-Asocio por la jaro 1971, plenumendan de ĉiuj organizaĵoj de PEA.

Dum la kunsido la prezidanto, en la nomo de la Ĉefa Estraro, bondeziris al la tri ĉeestantaj jubileantoj, kiuj pasintjare solenis la jarkvindekon de sia Esperanto-agado, kaj nome al s-ino Maria Krausowa el Sosnowiec, al s-ro Kazimierz Małycha el Bydgoszcz kaj el s-ro Jan Zawada el Varsovio, kiu estis ĵus distingita pro sia agado per la distingo „Meritplena Kulturaganto de Pola Popola Respubliko”.

JERZY MAŻYS

Wytyczne do pracy Polskiego Związku Esperantystów na rok 1971*

przyjęte przez Zarząd Główny PZE w dniu 22. XI. 1970 r.

Działalność Polskiego Związku Esperantystów w roku 1971 skierowana będzie na:

- 1) wzmożenie akcji propagandowej na rzecz esperanta wśród społeczeństwa polskiego
- 2) uporządkowanie spraw organizacyjnych Związku w oparciu o nowy statut
- 3) zwołanie Krajowego Zjazdu Delegatów.

Zadaniem pierwszoplanowym jest wzmożenie akcji propagandowej na rzecz esperanta. Musimy pokazać społeczeństwu, a w pierwszym rzędzie środowisku nieesperanckiemu, wśród którego działamy, że esperanto jest wysoce użyteczne w szczególności w dziedzinie kultury, propagandy osiągnięć Polski Ludowej oraz w dziedzinie zbliżenia między narodami.

Dlatego też naszymi hasłami na rok 1971 powinny stać się:

- a) Esperanto — kluczem do zbliżenia między narodami,
- b) Esperanto w służbie propagandy osiągnięć Polskiej Rzeczypospolitej Ludowej,
- c) Zapoznajemy esperantystów całego świata z historią i kulturą narodu polskiego.

Pod tymi hasłami, oraz w oparciu o terminarz prac PZE, Zarządy Oddziałów wspólnie z delegatami na Zjazd Krajowy winny opracować plany działania oraz przeprowadzić szeroką akcję propagandową. Zagadnieniem następnym jest uporządkowanie spraw organizacyjnych naszego Związku. Pierwszym krokiem dotyczącym uporządkowania tych spraw jest

uchwalenie przepisów wykonawczych do statutu, co jest bogatym plonem Plenarnego Zebrania Zarządu Głównego z dn. 22.XI.1970 r. Obecnie, w oparciu o uchwały podjęte przez Zarząd Główny, wszystkie jednostki naszego Związku będą musiały dokonać pewnego wysiłku w celu aktywizacji działalności, uporządkowania spraw organizacyjnych obok dokonania wyborów władz wszędzie tam, gdzie zachodzi tego potrzeba. W zakresie spraw organizacyjnych program naszego działania można podzielić na trzy etapy.

I etap — przeprowadzenie nadzwyczajnych wojewódzkich zebrań członków. Powinny to być zebrania uroczyste, z udziałem możliwie wszystkich członków PZE z terenu całego województwa, przeprowadzane pod hasłami ustalonymi na rok 1971, z udziałem zaproszonych gości, a wśród nich i przedstawicieli władz miejscowych. W programie tych zebrań winien znaleźć się referat na temat związany z zadaniami i rozwojem ruchu esperanckiego, nawiązujący, do spraw najbardziej aktualnych dla danego województwa. Należy również zapewnić — w miarę możliwości — interesującą część artystyczną, która ukazywałaby przydatność esperanta do propagowania kultury i folkloru polskiego. W ramach walnych zebrań, w uroczystym nastroju, należy dokonać **wyboru delegatów na Zjazd Krajowy**, a w tych województwach, w których powołane są Oddziały Wojewódzkie — dokonać również wyboru władz. Ten etap pracy powinien być zakończony do 31 marca 1971 r.

II etapem będzie praca propagandowa mająca na celu rozwój ruchu esperanckiego i przyciągnięcie do grona naszych aktywistów wartościowych ludzi ze środowiska, w którym ci aktywiści działają. Zorganizowanie akcji wer-

* Indukoj pri la laboro de la Pola Esperanto-Asocio por la jaro 1971 (detalaj organizaj indikoj por la lokaj unuoj)

bunkowej nowych członków i wzmocnienie organizacyjne Oddziałów i Kół powinno stać się sprawą ambicji każdego Zarządu i każdego delegata na Zjazd Krajowy. Oczekuje się, że delegaci wybrani na **Zjazd Krajowy** wykażą największą inicjatywę w tym względzie i będą siłą napędową wszystkich ogniw naszego Związku.

W drugim etapie pracy, który powinien zakończyć się do końca maja 1971 r. powinna być przeprowadzona weryfikacja Oddziałów, w myśl uchwały Zarządu Głównego oraz ustanowiona realna podstawa działania dla jednostek naszego Związku. Tam, gdzie obecnie jeszcze — mimo wysiłków naszych aktywistów — okaże się, że sytuacja nie dojrzała do działania na szczeblu Oddziału, należy ułatwić pracę naszym członkom, i przedstawić formy organizacyjne dostosowując je do działania w ramach organizacyjnych Koła. Nie należy się obawiać zmian statusu Oddziału na Koło, gdyż pożyteczniejsza może być dobra działalność Koła, aniżeli słaba działalność Oddziału. Poza tym często koło środowiskowe może znaleźć łatwiejsze poparcie finansowe i moralne danego środowiska, aniżeli działając jako oddział. Z drugiej jednak strony **należy dążyć do stałego rozwoju naszej organizacji**, przygotowywać teren przez prowadzenie przemyślanej działalności propagandowej, a gdzie znajdzie się grunt podatny — doprowadzać do powoływania nowych kół. W tej akcji oczekujemy wydatnej pomocy delegatów wybranych na Zjazd Krajowy.

Po przeprowadzeniu weryfikacji, to znaczy po dostosowaniu form organizacyjnych do realnych możliwości działania, należy **przeprowadzić we wszystkich jednostkach naszego Związku, gdzie zachodzi tego potrzeba, wybory nowych władz**. Organizowane walne zebrania sprawozdawczo-wyborcze winny dokonać podsumowania działalności organizacyjno-propagandowej przede wszystkim za ostatni okres działania. Powinny ocenić dotychczasowy wkład pracy delegatów na Zjazd Krajowy oraz skupić swoją główną uwagę na planie działania na przyszłość. Zebrania te również winny mieć charakter uroczystego sejmiku, wytyczającego drogę ku realizacji haseł wysuniętych przez Zarząd Główny naszego Związku. Niechaj na zebraniach tych głównym tematem nie będzie biadolenie, ale konkretne wnioski wpływające z popełnionych przez nas w przeszłości błędów. **Wysuwajmy twórcze wnioski dotyczące celów i sposobów sprawnego działania naszego ruchu**.

Etapem III będzie przygotowanie naszego Związku do **Krajowego Zjazdu Delegatów**, który powinien odbyć się pod koniec 1971 roku. Na Zjeździe Krajowym delegaci powinni zaprezentować wyniki swojej aktywnej pracy na temat dalszego rozwoju naszego ruchu. **Zjazd Krajowy winien być przeglądem osiągnięć naszego ruchu oraz wytyczyć dalszą drogę rozwoju Polskiego Związku Esperantystów** i pod tym kątem widzenia nasi aktywiści wszystkich szczebli powinni prowadzić działania.

Ażeby jednak prowadzić aktywną działalność propagandową i organizatorską, powinniśmy uświadomić sobie pewne zasady działania wprowadzić oczywiście, ale niekiedy przez naszych aktywistów zapomniane. Chodzi tu mianowicie o podział zadań. Zależnie od szczebla, na którym działamy, różne są nasze zadania. Spróbujmy zatem sfor-

mułować — w grubym zarysie — **zadania jednostek poszczególnych szczebli naszego Związku**.

1. **Zadaniem kół**, które są podstawowymi jednostkami naszego Związku jest propaganda esperanta na terenie swego środowiska i terenie działania oraz prowadzenie prac leżących w sferze zainteresowania członków koła.

2. **Zadaniem Oddziałów** jest ponadto aktywne oddziaływanie na środowisko nieesperanckie, prowadzenie interesujących zajęć dla członków oraz koordynacja pracy kół będących w zasięgu działania Oddziałów.

3. **Zadania Zarządów Oddziałów Wojewódzkich** obejmują, oprócz tych zadań, które są zadaniami Oddziałów, również działalność popularyzatorską i organizatorską na terenie całego województwa, dbałość o rozwój ruchu, inspirowanie podległych Oddziałów do zakładania kół, organizowanie Oddziałów, a także odpowiednią współpracę z władzami wojewódzkimi, mającą na celu ukazanie twórczych wartości naszego ruchu w propagandzie osiągnięć regionu za granicą.

4. Wreszcie **zadaniem Zarządu Głównego** jest przede wszystkim koordynacja działalności esperanckiej na terenie całego kraju, prezentowanie władzom centralnym osiągnięć ruchu esperanckiego w kraju oraz ukazywanie nowych możliwości wykorzystania esperanta w stosunkach międzynarodowych, a w szczególności dla zbliżenia między narodami.

Zasady gospodarności wymagają, by działalność naszych jednostek organizacyjnych była samowystarczalna z punktu widzenia finansowego. Stąd też im większe dochody uzyskuje dana jednostka, tym większe ma możliwości i swobodę w zakresie swojego działania. Wiadomo jednak, że dochody ze składek, pozostające w dyspozycji Koła czy Oddziału nie są zbyt wielkie. Wobec tego należy szukać możliwości zwiększenia dochodów w ramach działalności statutowej naszego Związku — poprzez organizowanie składkowych wieczorków klubowych, poprzez organizowanie wewnętrznych imprez z dobrowolnymi opłatami, poprzez intensywną akcję werbowania członków wspierających, czy też w inny sposób — właściwy i możliwy do zrealizowania na danym terenie. Jeżeli wysilimy nasz koncept w tym kierunku, na pewno będzie można znaleźć odpowiednie formy działania, które przyniosą pozytywne rezultaty. Nie należy bowiem zapominać, że finansową podstawą działalności Zarządu Głównego są w przeważającej mierze składki, które w określonym procencie odprowadzane są (i to nie zawsze regularnie) przez poszczególne Oddziały. Dlatego też Zarząd Główny nie jest w stanie udzielać pomocy finansowej Oddziałom i apeluje do wszystkich jednostek o rozwinięcie inicjatywnej działalności zmierzającej do gospodarnego działania na zasadach samowystarczalności.

Reasumując — **działalność nasza może przynieść i przyniesie zamierzone przez nas rezultaty: umocnienie naszych organizacji i rozszerzenie działalności** tylko wówczas, jeżeli **działać będziemy aktywnie, a wszelka zdrowa inicjatywa będzie przez Zarządy wszystkich szczebli twórczo rozwijana**.

MILDA JAKUBCOVÁ

Printempo en februaro

*Jam primavera spiro
Senteblas en aer',
Eksonu mia liro
Al vekigonta ter'!*

*Sur stratoj, neĝ' degelas
De varma sun' kares',
Birdaro amkverelas
Dum verva sinforĝes'.*

*Eĉ mia olda koro
Ne volas stagni plu,
Ĝi kun junec-fervoro
Sopiras al viv-ĝu'.*

*Ho, venu primavero
Kun reviviga flam'!
Post vintra ŝtorm-vespero
Aŭdiĝu ama gam'!*

TAGO DE LA ESPERANTA LIBRO

Estis mirinde bela aŭgusta tago de la 1957 jaro. Sur la plej populara strato de Marsejlo, sur la strato La Canebière svarmis multmila homamaso, kiel kutime en granda havenurbo. Miksiĝis buntaj vestoj, diversis la haŭtkoloroj, bruete aŭdiĝis interparoloj ŝajne en ĉiuj lingvoj de la mondo.

Kelkcenton da metroj pli for, ĉe Boulevard Voltaire ankaŭ irize brilis en sunradioj la popolkostumoj de pluraj nacioj, ankaŭ oni povis vidi ĉiujn rasanojn, sed la lingvo sonis komuna. Estis okazanta tie laŭvica Universala Kongreso de Esperanto.

Por mi, juna studento, la unua en mia vivo.

Jam pli frue mi nodis korespondan kontakton kun pluraj esperantaj plumhomoj kaj mi esperis, ke iujn el ili mi ekkonos persone en Marsejlo. Kaj efektive — sur la kafeja teraso de la Instituto de la Sciencoj, kie la kongresanoj ripozis dum la interdebataj paŭzoj, mi tuj rekonis unu el la plej eminentaj Esperanto-poetoj, skoton William Auld, kiu sidis ĉe kaftaso, profundiginte en viglan diskuton kun iu persono al mi ne konata.

Mi ekstaris tutproksime, sed iom kaŝata de marmora kolono kaj ĝia ombro. Kaj mi komencis duonvoĉe reciti: „Saluton, masonisto! Prapatro mia, Ruben, kiu dum tuta vivo grimpadis supren, suben, ĉizante sur preĝejoj gargojlojn kaj anĝelojn. Mi vin salutas. Ave!”

Mi klarigu al la nesciantoj, ke ĝi estas alvoko el la poemo de William Auld — „La infana raso”, sendube la plej granda verko de la originala Esperanto-poezio, kiu ĝis nun estas kreita.

Mi vidis, ke William Auld estis kaj surprizita kaj kortuŝita, kaj mi ne scias, kiu el la du sentoj pli reliefigis sur lia vizaĝo. Ŝajnas tamen, ke la surprizo dominis.

Kaj en tiu ĉi momento mi rememoris la vortojn de alia granda plumhomo esperanta — hungaro Kalman Kalocsay, kiu plendis siatempe, ke „poeto li estas sen popolo”.

La granda poeto Auld estis kortuŝita, sed unuavice surprizita, ke oni parkeras iom el lia poemo. Eble ankaŭ li sentis sin kvazaŭ „poeto sen popolo” kaj eble sub la impreso de mia spontana gesto salute al li — Auld ekkomprenis, aŭ — pli ĝuste — ekkredis, ke tamen la popolo ekzistas. Eble ankoraŭ ne amasa, eble ankoraŭ ne je la rango de lia kreado, sed tamen ekzistas. Ĉar jen unu el la popolanoj memoras liajn versojn.

Ĝuste pri tiuj aŭgustaj tagoj en Marsejlo mi pensis, kiam mi estis preparanta ĉi tiun kontribuon al la hodiaŭa solenaĵo, kiu okazas en la 111 datreveno de la naskiĝo de Ludoviko Zamenhof kaj kiu samtempe estas Internacia Tago de la Esperanta Libro, laŭ la propono de alia granda poeto esperanta, ankaŭ hungaro — Gyula Baghy.

Ne hazarde mi parolis en la komenco pri Auld, pri Kalocsay, pri Baghy. Paroli pri esperantaj libroj sen paroli pri iliaj aŭtoroj — estus kvazaŭ paroli pri „Dia komedio” sen mencii pri Dante. Tamen. Ĉu estus „Dia komedio” sen Beatrice? Kaj ĉu Beatrice estis nur la inspirfonto aŭ eble ankaŭ la unua leganto de Alighieri?

La literaturo devas ĉerpi siajn sukojn el la vivo. La verkista imago estas nur tiu lanugeca ŝelo, kiu kovras la ŝvelan persikon. Jes, sed la karno de la persiko estas la tuta historio, la tuta kulturo, la tuta lingva kaj literatura evoluo de koncerna nacio.

Kaj esperanto? Kreita de Ludoviko Zamenhof en epruveto — ĉu ĝi ekhavas tiun vivofajreron, pri kies sparkiĝo revas la nuntempaj magoj miksaŭte la fiŝnukleinan acidon ADN por elŝiri de la naturo ĝian plej grandan sekreton — la sekreton de la vivo.

Kaj ĉu ne samtiel sin sentis la unuaj homoj disde la mondo, kiam ili estis ricevintaj en la manon tiun artefaritan lingvon? Cetere, la kreinto mem de la lingvo ne tuj kredis, ke lia kreitaĵo povas esti

io pli, ol iu rigida kodo. En letero al Borovko li skribis pri la estiĝo de Esperanto, pri tio, kiel li laboris super ĝi ankoraŭ jarojn, kiu en la 1878 jaro ŝajnis al li esti preta. Li skribis — mi citas:

„La praktiko do ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekapteblan „ion”, la kunligantan elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan, formitan „spiriton”... Mi komencis tiam evitadi laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo, kaj pensis rekte en la lingvo neŭtrala. Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj ĉesis jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo... kaj ricevas sian difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, ne dependantan jam de iaj influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo”.

Kreinte la propran stilon de Esperanto, Zamenhof faris el la internacia lingvo instrumenton taŭgan por pli altaj celoj, ol la nura interkompreniĝo de diverslingvanoj pri ajna temo.

Kiam en la jaro 1887 aperis la unua libro en Esperanto — ĝi enhavis, krom tradukaĵoj, ankaŭ du originalajn poemojn: „Ho, mia kor’” kaj „Mia penso”. Ili estis burĝoneto, promesanta iaman disfloron.

La ŝanco do estis donita. La vojo disdubiĝis ekde la komenco mem. La vojo. Eble tro granda vorto. Du intermontaj padetoj meandrantaj eskape de la homa moko, malfido, dubo, rikano. Kaj tamen trabatantaj por si la kuron, kaj tamen surirataj de pli kaj pli multaj.

La unua malfacila pado estis la pado de la originala kreado. Necesis tamen levi sin super la propran pensmanieron, transpasi la kadron de la propralandaĵ limoj. Necesis samtempe vidi la ĝiban figuron de ĉino sin klinanta pene super la sulkoj de rizokampo kaj la italan vitiston plukanta la grapolojn de vinberoj, la peruanon penetranta la makisojn de praarbaro kaj la polan kamparanon pluganta la teron sub cikonia beno. Necesis vidi kaj senti homare. Necesis kapabli preni la plej valoran el la plej valora. Por ke tio ĉi estu komprenata de ĉiuj, kiel de ĉiuj komprenata estas la pensvito kaj la infana rideto.

Ne estus senco nun listigi la nomojn kaj la titolojn de la originala verkaro en la internacia lingvo. Sed almenaŭ la ĉefajn mi menciu: germano Heinrich Luyken, hungaro Gyula Baghy, franco Raymond Schwartz, svedo Stellan Engholm, norvego Johan Hammond Rosbach, rusoj Jevgienij Miĥalskij kaj Nikolaj Hoĥlov, hungaro Kalman Kalocsay, brazilano Jorge Maura, skoto William Auld, dano Poul Thorsen, italino Clelia Conterno, franco Gaston Waringhien, islandano Baldur Ragnarsson, ĉeĥino Milda Jakubcová.

La alia pado estis eble eĉ pli malfacila. Ĝin ĝenis la jama formo de la verkoj. Oni ne povis doni al ĝi la propre imagitan veston. Oni devis kapabli transdoni ĝin.

Ja estas konate, ke la tradukita Esperanto-literaturo alproprigis multegajn ĉefverkojn de la monda literaturo — ekde la Biblio, tra la grandaj naciaj epoj — kiel la finna „Kalevala” aŭ „La tragedio de l'homo” de Imre Madach — ĝis la plej avangardaj verkoj, kiel „La respektinda putino” de Jean Paul Sartre.

La mortinta tragike antaŭ tri jaroj eminenta lingvosciencisto, profesoro Zenon Klemensiewicz, diris, ke „Esperanto estas atingiĝo de la pola kulturo”.

Elkreskinte el la pola kulturo, la internacia lingvo fariĝis poste laborema, penema servanto al tiu ĉi kulturo.

„Sinjoro Tadeo” en la traduko de Antoni Grabowski, laŭ mia forta konvinko — unu el la plej bonaj

La Ora Jubileo de „La Ora Koro“



La Jubileanto —
s-ano Jan Zawada

sindikata movadoj, organizanto kaj lekcianto en centoj da klerigaj kursoj, li estis kunfondinto kaj aktivulo de la Asocio de Polaj Liberpensuloj, aŭtoro de multaj publikaĵoj rilatantaj Esperanton kaj kooperativismon.

En la intermilita periodo s-ano Zawada aktive laboras en kooperativa movado en Lublino (1921—1925). Tamen la tiamaj burĝaj aŭtoritatoj enkarcerigas lin kaj liajn gekolegojn pro „komunismaj tendencoj“.

En la periodo de la hitlera okupacio li partoprenas en sekreta „subtera“ instruado, kaj post la liberigo de la lando li komencas labori en la Pola Komitato por Nacia Liberigo (PKWN) en Lublino, kiel estro de la Kooperativa Departamento (kaj do en la rango de ministro), kaj sekve kiel direktoro de la Ŝtata Kooperativa Konsilantaro. Poste, ĝis la pensiuliĝo, li daŭrigas sian laboron en kooperativaj organizaĵoj, okupante diversajn postenojn.

En la esperantista movado s-ano Jan Zawada laboras ekde la 1920 jaro, komence en la „Laborista Esperanto-Societo — Praca-Laboro“, kiu la burĝaj aŭtoritatoj de la tiam Pollando malfondis pro „komunismaj tendencoj“, kaj poste en la Pola Esperanto-Asocio.

Dum la okupacio li nelegale instruas Esperanton, kio tiutempe minacis per mortopuno. Tuj post la liberigo de la lando li aliĝas al la unuaj aktivuloj, kiuj revivigas la

La 11-an de novembro en la sidejo de la Pola Esperanto-Asocio okazis grava kaj solena aranĝo. La varsoviaj esperantistoj festis la jubileon de la 50-jara poresperanta kaj peresperanta agado de s-ano Jan Zawada, unu el la plej meritplenaj aktivuloj de la E-movado en Pollando.

Jan Zawada, kies nomo estas bone konata en la esperantista kaj kooperativista medioj, estas homo eksterordinara. Siajn diversflankajn interesiĝojn, profesian laboron kaj socian agadon en kooperativaj organizaĵoj li ĉiam scipovis kunligi kun oferema kaj vere fruktodona agado en la E-movado. Kaj ni devas akcenti, ke en ĉi-lastata agado abundis tiom valoraj entreprenoj kaj iniciatoj, ke lia nomo enskribiĝis per oraj literoj en la historio de nia movado.

Sed — kiel oni supre menciis — s-ano Jan Zawada havis diversflankajn interesiĝojn. Li estis elstara aganto de la kooperativisma kaj

La I Vicprezidanto de PEA, Jerzy Uśpieński faras porokazan paroladon



polan E-movadon. En la pasintaj 26 jaroj li plenumas diversajn respondecajn funkciojn en PEA (sekretario, ĝenerala sekretario, vicprezidanto kaj prezidanto de la Ĉefa Estraro), li aktive partoprenas kiel sekretario de la LKK en la preparlaboroj por la 44 UK en 1959. Aktuale li prizorgas la arkivon de PEA kaj kolektas, respektive mem verkas, artikolojn por la aperigota Enciklopedio de Esperanto.

En la tuta postmilita periodo li vaste propagandas Esperanton per artikoloj kaj prelegoj, li ankaŭ kontribuas al diskonigo de la scioj pri la nuntempa Pollando kaj ĝiaj kulturo kaj literaturo en eksterlandaj esperantistaj medioj. I.a. li tradukis la eseon „Adam Mickiewicz” de Mieczysław Jastrun, kiu sekve el Esperanto estis tradukita en la ĉinan. Postmilite reaperas liaj vortaro kaj lernolibro de E-o, per kiuj lernis la lingvon kelkaj esperantistaj generacioj.

Alte taksante lian agadon kaj rekoninte lian grandan kontribuon al la disvolvo de la pola E-movado, la Landa Kongreso de Polaj Esperantistoj en 1961 en Vroclavo atribuis al li la titolon „Honora Membro de PEA”.

Ni tamen revenu al la enkonduke menciita jubilea solenaĵo, kiun ĉeestis pli ol 100 personoj. La vivoj de la estiminda Jubileulo bildigis al la kuhvenintoj la vicprezidanto de PEA, red. Jerzy Uśpieński. Liajn finajn vortojn pri la medalo, kiun la Jubileulo plenmeritas, sed kiu bedaŭrinde ne ekzistas, nome pri „medalo de ora koro”, la ĉeestantoj akceptis per tondraj aplaŭdoj.

Sekve per vortoj fluantaj el la profundo de la koro alparolis la Jubileulon la prezidanto de la Ĉefa Estraro de PEA, mag. Lech Kosieniak, kiu enmanigis al li la distingon de „Mertiplena Kulturganto”, atribuitan de la Ministro por la Kulturo kaj Arto, Lucjan Motyka, pro la tuto de la peresperanta kontribuado de s-ano Zawada al la diskonigado de la pola kulturo en la mondo. La prezidanto enmanigis ankaŭ al s-ano Zawada

La Prezidanto de PEA, Lech Kosieniak, distingis la Jubileanton per la insigno „Meritplena Kulturganto de Pola Popola Respubliko”



belan manhorloĝon — memordonacon de PEA kaj florbukedon. Plurajn florbukedojn enmanigis al la Jubileulo kun la deziroj de ĉiuspeca prospero la varsoviaj esperantistoj. En la nomo de blindaj esperantistoj bondezirparoladon faris red. Józef Śmietanko, la prezidanto de la E-Sekcio ĉe la Pola Blindul-Asocio, redaktoro de la pola brajla E-revuo „Pola Stelo”. Red. Śmietanko akcentis, ke la brajligita E-vortaro de Jan Zawada ĝis hodiaŭ bone servas al ĉiuj polaj nevidantoj.

Parolon prenis la kortuŝita Jubileulo, dankante pro la esprimoj de simpatio kaj rekono, kaj sekve en arta parto de la programo kanzonis en Esperanto la konata varsovia aktoro kaj kanzonisto — Andrzej Tomecki, prezentante amplek-

sajn fragmentojn de sia E-spektaklo „Kaj tamen estas Varsovio”.

La komuna kantado de la populara pola kanto „Cent jarojn vivu li kun ni” finis ĉi tiun belan aranĝon, kiu al la juna generacio esperantista fariĝis leciono pri la modelo de socia agado.

Por la fino estas akcentinde, ke la jubilean solenaĵon akompanis enpense ĉiuj polaj esperantistoj. Ili esprimis sian simpatian al la Jubileulo per dekoj da telegramoj kaj leteroj kun elkoraj bondeziroj. Al la bondeziroj aliĝas ankaŭ la redakcio de „Pola Esperantisto”, dezirante al la Jubileulo multajn serenajn tagojn en la vivo, pluajn sukcesojn en la poresperanta kaj peresperanta agado.

Andrzej Pettyn

DANKLETERO

Al ĉiuj membroj de la Ĉefa Estraro de la Pola Esperanto-Asocio, al la gekolegoj el la Varsovia Filio de PEA, al la Rondo de Esperantaj Senjoroj kaj al ĉiuj aliaj, kiuj kontribuis al la organizo de la Jubilea Festvespero okaze de mia 50-jara poresperanta agado kaj kiuj bonvolis honorigi ĝin per sia ĉeesto, mi diras mian plej profundan, elkoran dankon.

Tutsame mi dankas al ĉiuj Regionaj kaj Filiaj Estraroj de PEA, individuaj geamikoj esperantistoj kaj ĉiuj aliaj, kiuj sendis al la Asocio aŭ senpere al mi gratulleterojn, kartojn kaj telegramojn. Ni fosu plue nian sulkon!

Estimplene kaj samideane
JOHANO ZAWADA

EN LA MONDO

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

NÜRNBERG. Post la apero de provnumero „O”, printempe ĵus aperis n-ro 1 de INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO en la eldonejo LUDWIG PICKEL, Nürnberg. La 1 numero ampleksas 30 paĝojn en la formato 16,5 × 24 cm. El la enhavo menciindas:

Rudolf Rakusa, Maribor: „La Lingvo Internacia en la establita mondo”

Prof. D-ro Kazimierz Wojciechowski, Varsovio, „La memlernado teorie kaj praktike”

Helmut Sonnabend, Dollbergen, „La instruado de Esperanto — Regularo de la Internacia Ekzameno por instruistoj membrigintaj en ILEI”

La programoj de Filologia Fakultato, Fako Esperanto Lingvo kaj Literaturo de la Universitato Eotvos Lorand Budapeŝt.

Abonprezo de IPR por tri numeroj 6, — GM; unuopa numero kostas 3, — GM. Mendu ĉe Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 2, Postfach 2113.

LENIN PRI LIBROJ KAJ BIBLIOTEKOJ

Tre modernaj estis la ideoj de V. I. Lenin pri utiligo de bibliotekoj. Jam en 1911 li laŭdis la Publikan Bibliotekon de New York, kiu en unu jaro servis al 1.658.376 personoj. „Fiero kaj gloro por publika biblioteko” — li skribis — „troviĝas ne en la nombro da raraj venkoj, da eldonaĵoj de la XVI jarcento aŭ manuskriptoj de la X,

kiuj tie troviĝas, sed en la ampleksa diskonigo de libroj *inter la homamasoj*, en la nombro de nove varbitaj legantoj, en la rapida kontentigo de ĉiu libro-peto, en la nombro da libroj liveritaj al hejmoj, en la nombro da infanoj allogitaj al legado kaj al ĝuado de la biblioteko...”

Ankaŭ post la rusa revolucio daŭris lia intereso pri diskonigo de libroj. Li esprimis la deziron, ke oni

povu „en la daŭro de nur unu jaro, kaj malgraŭ niaj nunaj malfacilaĵoj, doni al la amasoj ĉiujn necesajn lernolibrojn kaj ĉiujn neprajn klasikaĵojn de literaturo, kaj de modernaj scienco kaj tekniko, po du ekzemplerojn por ĉiu el la 50 000 bibliotekoj kaj legejoj...”

(Laŭ Unesko-Novajoj kaj informa Servo de UEA)

Ni travivu tion ankoraŭfoje...

La partoprenantoj de la Universala Kongreso en Vienno en la pasinta jaro aŭskultas la himnon „La espero”. En la unua plano — la prezidento de Aŭstrujo, d-ro Franz Jonas



BONVENON EN KOSZALIN!

La konata kaj treege ŝatata agantino de nia movado, s-anino mag. MARIA KRAUSOWA solenis en la pasinta jaro la Jarkvindekon de sia esperantistina agado.

La Jarkvindekon de sia esperantista agado solenis ankaŭ en la pasinta jaro membro de la Ĉefa Estraro de PEA, s-ano red. KAZIMIERZ MAŁYCHA, tre meritplena precipe sur la kampo de la gazetara informado pri Esperanto kaj esperantista movado. S-ano Małycha de 16 jaroj aperigas en la ĵurnalo „Ilustrowany Kurier Polski” („Ilustrita Pola Kuriero”) en Bydgoszcz centojn da informoj kaj artikoloj pri Esperanto.

Detalajn informojn pri la trapaso de la solenaĵoj ni aperigos en unu el la plej proksimaj numeroj de „Pola Esperantisto”

VARSOVIO. La 15-an de decembro 1970 la varsovia esperantistaro solene festis la 111-an datrevenon de la naskiĝo de Ludoviko Zamenhof kaj la Tagon de la Esperanta Libro.

Ĉi tiun solenaĵon, kiu okazis en la salonego de la Klubo de la Internacia Gazetaro kaj Libro ĉe la strato Nowy Świat 11/13, inaŭguris red. Jerzy Uśpieński, klariginte en mallonga pollingva kaj esperantlingva parolado (ĉar la kunvenon ĉeestis multaj neesperantistoj) la kaŭzon de la kunveno kaj la signifon kaj celojn de la esperantista movado.

La ĉefan prelegon, nur en Esperanto, faris red. Jerzy Grum, membro de la Prezidumo de la Ĉefa Estraro de la Pola Esperanto-Asocio. La prelegon vi trovas aliloke en tiu ĉi numero de „Pola Esperantisto”.

La oficialan parton finis enmango de rekondiplomoj al meritplenaj agantoj de la ĉefurba esperantista movado. Inter la distingitoj estis sufiĉe granda grupo de gejunuloj.

Post la oficiala parto sekvis mallonga paŭzo, dum kiu la gastoj rigardis ekspozicion de Esperanto — eldonaĵoj kaj aĉetis librojn, lernolibrojn, vortarojn kaj aliajn esperantaĵojn. La lastatempe eldonitan „Polan-Esperantan Vortaron” — laŭ la kutimo de la pollandaj Tagoj de la Klerigo, Libro kaj Gazetaro — subskribadis la aŭtoro, Kazimierz Tymieński.

En la arta parto donis recitalon artistino-kantistino Danuta Alczewska-Klus, kiu akompanate de Barbara Halska plenumis plurajn belajn kantojn de polaj komponistoj. La koncerto tre plaĉis al la publiko kaj la kantistino devis bis-kanti. La tekstoj de la kantoj estis esperantigitaj de Alina Nowak kaj Andrzej Pettyn.

H. S.

Antaŭ nelonge aperis en Pollando nova Esperanto-eldonaĵo, titolita „La turisma informilo” — pri Koszalin kaj koŝalina vojevodio.

En tiu ĉi negranda, sed interesenhava broŝureto unualoke troviĝas historia priskribo de la koŝalina regiono, kiu rekuniĝis kun Pollando, samkiel la ceteraj nordaj kaj okcidentaj teritorioj, surbaze de la Traktatoj en Jalta kaj Potsdam. Sekvas prezento de la postmilita evoluo de la urbo kaj de la vojevodio sur diversaj kampoj kaj fine ni atingas la ĉeftemon de la broŝureto — en la subĉapitreto: „Kio estas vizitinda en Koszalin kaj ĝia ĉirkaŭaĵo?”. En ĉi tiu ĉapitreto estas prezentitaj ĉiuj antikvaĵoj, kaj ankaŭ novaj vidindaĵoj, inter kiuj troviĝas unu, kiu koncernas Esperanton.

Mi citas:

„Apud Klubo de la Internacia Gazetaro kaj Libro troviĝas memorŝtono omaĝe al d-ro Ludoviko Zamenhof, malkovrita oktobre de la 1969 jaro okaze de la 10-jara poresperanta agado de la Filio de la Pola Esperanto-Asocio en Koszalin” — fino de la citaĵo.

En la sama ĉapitreto ni legas pri diversaj ripozlokoj en kaj proksime al Koszalin. Multaj el ili estas aparte rekomendindaj por eksterlandanoj, ĉar oni povas en ili ne nur ripozi, sed ankaŭ — kiel ekzemple en Kołobrzeg — subiĝi al kuracado.

Ĉe la fino de la broŝureto troviĝas adresoj de la turismaj oficejoj en Koszalin, kaj ankaŭ la adreso de la loka Filio de la Pola Esperanto-Asocio, kiu — kiel oni akcentas en la broŝureto — volonte helpas la eksterlandajn turistojn dum ilia restado en la urbo.

La broŝureton fermas la slogano „Koszalin invitas vin per BONVENON!”, kiu slogano estas ankaŭ lokita sur la titolpaĝo de tiu ĉi eldonaĵo. La broŝureton pri Koszalin aperigis en Esperanto la Vojevodio Turisma Informejo de tiu ĉi urbo, kunlabore kun la tiea filio de PEA, kaj en Esperanton tradukis ĝin magistro Czesław Baranowski.

Estas aldoninde, ke la E-Redakcio de la Pola Radio ricevis stokon da broŝuretoj por senpaga distribuo inter la eksterlandanoj interesigantaj pri la ĉarma koŝalina regiono. Oni petu la broŝureton ĉe: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Varsovio 1. Box-46, Pollando.

ANDRZEJ PETTYN

RENKONTIĜO DE VARSOVIAJ ESPERANTISTOJ ĈE LA TOMBOJ DE UNUAJ ESPERANTISTOJ

La 20-an de decembro 1970 okazis renkontiĝo de membroj de la Varsovia Filio ĉe la tombo de Ludoviko Lazaro Zamenhof, por omaĝi la 111-an datrevenon de Lia naskiĝo.

La organizinto de la renkontiĝo, s-ano Jerzy Gralak, metante florojn sur la tombon, diris ia:

”(…)

La pli ol 80-jara historio de nia lingvo klare montras, ke la granda ideo de nia Majstro — interamikigi homojn de ĉiuj nacioj kaj rasoj ĉiam estas aktuala kaj nepre necesas por paca evoluo de nia civilizo.

(…)

La modestaj floroj, kiujn mi hodiaŭ metas sur la tombon de nia Majstro fariĝu simbolo de unueco, farata dank’ al Esperanto.”

La saman tagon grupo de varsoviaj esperantistoj, gviditaj de s-anino H. Zapolska, ekskursis tra la katolika tombejo. La ekskurso, kies celo estis tomboj de famaj poloj, finiĝis per vizito ĉe la tombo de alia granda esperantisto, Antoni Grabowski.

(J. G.)

ESPERANTO INTER SKOLTOJ

En la nuna lernojaro en la Ekonomia Teknikumo en Szczecin, kie jam de kelkaj jaroj instruas Esperanton al kelkaj klasoj s-ino Janina Czeraszkievicz, pasintjare oni enkondukis la internacian lingvon ankaŭ en 2 skoltajn trupojn. S-ino Czeraszkievicz preparas junularon al akiro de la lerteco „esperantisto”, laŭ la skolta regularo. Jen la unua lernejo en Szczecin, en kiu la skolta lernantaro en junio prezentos sian lertecon kiel esperantistoj. Sekvu aliaj!

JUNULARA PALACO EN SZCZECIN, kies Esperanto-laborejo funkcias jam 7 jarojn, daŭre kontinuiĝas la laboron de 6 rondoj de junaj esperantistoj, kiuj distingiĝas per sia socia aktiveco en diversaj branĉoj, akirante favoron de la klerigaj aŭtoritatoj. La plej aĝaj rondoj protektas la novbakitan E-rondon en Teknikumo de la Telekomunikado.

KONVERSACIAJ RENKONTOJ EN LA OFICIRA GARNIZONA KLUBO okazas ĉiumerkrede je la 18.00 horo; gvidataj sukcese de s-ino Janina Czeraszkievicz jam de kelkaj jaroj, ili lastatempe plivigliĝis. Dum tiuj ĉi renkontoj oni prilaboras diversajn lingvajn problemojn kaj pliprofundigas la parolkapablon. Dank’ al la fervora gvidantino, ĉiuj novaj kursanoj kuraĝas paroli Esperanton.

S. P.

La pola literaturo kaj esperanto en la praktiko

La II Internacia Kongreso de Tradukistoj de la Pola Literaturo, okazinta inter la 1 kaj 9 de oktobro 1970 en Varsovio kaj Krakovo, larĝe reeĥis en la pola gazetaro, radio kaj TV. Ĝi estis granda kultura aranĝo. Sed ankaŭ por la polaj — kaj ne nur polaj — esperantistoj ĝi estis evento. Ĉar la unuan fojon tian tre altrangan literaturistan renkonton partoprenis oficiale, kiel plenrajtaj delegitoj, ankaŭ esperantistoj. Kaj la iniciato inviti esperantistojn venis de la kongresorganizintoj. Kvarpersona delegacio de la esperantistoj-plumlaborantoj, kiuj povis dokumenti sian porliteraturan aplikon de Esperanto, estis reprezentanta nian lingvon kaj movadon en la kongreso. Kiel la Esperanto-delegitoj estis invitataj samideanoj: J. Grum, A. Pettyn, T. Tyblewski kaj J. Uśpieński.

La kongreso, organizita sub la aŭspicio de la Ministerio por la Kulturo kaj Arto fare de la Aŭtora Agentejo arigis pli ol 100 alilandajn tradukistojn el 20 landoj. Partoprenis ĝin plej elstaraj konantoj de la pola literaturo, i.a. el Sovetunio kaj Usono, Germana Demokratia Respubliko kaj Britujo, Ĉeĥoslovakio kaj Germana Federacia Respubliko. Ankaŭ venis — kaj ne malmultaj — reprezentantoj de tiel foraj landoj, kiel Japanujo kaj Mongolujo.

La kongreson ĉeestis, krom la eksterlandaj gastoj, ankaŭ elstaraj polaj verkistoj, kritikistoj, eldonistoj, ĵurnalistoj. Tial la apero de grupo da esperantistoj-tradukistoj inter ili estis signifoplena. Des pli, ke la esperantistoj estis facile rekonblaj, ĉar ĉiu el ili havis la nom-



S-anoj Jerzy Uśpieński, Tyburcjusz Tyblewski kaj Jerzy Grum en la kularoj de la Kongreso; la esperantistan trupon zelotas la edzino de s-ano Grum

ŝildeton kun la verda steleto kaj la surskribo: „Esperanto”.

Niaj delegitoj havis ankaŭ la eblecon paroli dum la diskutoj. Ili parolis eĉ du horojn. Parolon prenis s-ano Tyburcjusz Tyblewski kaj Jerzy Uśpieński. Iliaj elpaŝoj estis renkontitaj kun sufiĉe granda intereso. Pluraj personoj petis poste pliajn informojn kaj ili ricevis informbroŝurojn. La delegitoj ekligis interesajn personajn kontaktojn.

Kiel ni jam menciis, pri la kongreso multe skribis gazetoj, parolis la radio kaj televido. En pluraj artikoloj troviĝis mencioj pri la partopreno de la esperantistoj en la kongreso. Ankaŭ pluraj gazetoj menciis pri la elpaŝo de red.


Uśpieński, kiel la sola diskutanto el Pollando.

La tuta aranĝo donis okazon al ni por pluraj konkludoj koncerne la plej ĝustajn formojn kaj direktojn de nia agado en la kultura kampo. Ni revenos al ili en la sekva numero de nia gazeto.

Nun tamen necesas emfazi almenaŭ du konkludojn: ke la ĝisnunaj atingoj de nia esperantista laboro sur la kultura kampo estas rimarkataj kaj ĉiam pli alte taksataj en nia lando. Kaj due — ke ĉiuj seriozaj, praktikaj aplikoj de Esperanto pli aŭ malpli frue alportas valorajn rezultojn.

(jku)

La Prezidumo de la Kongreso — meze sidas Jarosław Iwaszkiewicz, la prezidanto de la Asocio de la Polaj Literaturistoj — paroladon faras Michał Rusinek, pola verkisto.



Ni profundigas la lingvokonon

(daŭrigo el la numero 6/70)

1) *mem*

Oni devas rimarkigi la diferencon inter la adverbo *mem* kaj la adjektivo *sola*.

Sola signifas *en izoliteco*, sen akompano de aliaj homoj, kaj *mem* signifas *persono* (eĉ inter aliaj homoj)

2) *de tempo al tempo*

de jaro al jaro

— signifas *ne ofte*

— signifas, ke en ĉiu sekvanta jaro io ŝanĝiĝas regule

(simile: *de tago al tago*

de semajno al semajno

de monato al monato)

3) *Mi opinias ĝin ornama meblo* (signifas: *Mi opinias, ke ĝi estas ornama meblo*

(simile: *Mi opinias lin bona kolego.*

Li opinias ŝin bela.

Ni opinias ilin amikoj.)

4) ... *ĝi koncernas ne nur tiun ĉi historion* ... signifas, ke la afero estas ligita ne nur kun tiu ĉi historio. La verbon *koncerni* oni uzas kun la akuzativo (simile: *Nia hodiaŭa temo koncernas niajn loĝejojn*)

Andreo: *Mi proponas ankaŭ ripeti kelkajn gramatikajn regulojn*

1) La uzo de la akuzativo koncerne la mezurojn *kvar metrojn longa, tri metrojn larĝa, pli ol tri metrojn alta*

2) La uzo de la volitivo en la esprimoj: *Mi dezirus, ke vi rakontu. Mi parolos malrapide, por ke vi komprenu*

Oni devas rimarki, kiam ni uzas nur *ke*, kaj kiam *por ke*. Kiam ni esprimas peton, proponon, deziron aŭ ordonon, ni uzas *ke*.

Ekzemple:

Mi petas, ke vi vizitu min

Mi proponas, ke ni iru al kinejo

Ni deziras, ke ili estu afablaj

Ŝi diris, ke li aĉetu panon

Kiam ni esprimas la celon de iu ago, ni uzas por ke

Ekzemple:

Mi alvenis, por ke vi ne estu sola

Li laboris multe, por ke lia familio ne estu malsata.

Ŝi aĉetis multekostan medikamenton, por ke ŝia filo resaniĝu.

3) Signifoj de kelkaj sufiksoj:

-iĝ esprimas ŝanĝiĝon de la stato (eniron en ian staton)

ekzemple:

fariĝi — *fari sin mem*

konvinkiĝi — *konvinki sin mem*

kontraŭe — *ig* esprimas: agi tiamaniere, ke iu aŭ io eniru en la staton, kiun indikas la radikoj

ekzemple:

klarigi — *fari ion klara*

nigrigi, — *fari ion nigra*

-ebl esprimas, ke oni povas fari tion, kion indikas la radikoj

ekzemple:

videbla plezuro — *tia plezuro, kiam oni povas vidi, rimarki*

-ar esprimas multon

infanaro — *multe de infanoj*

montaro — *multe da montoj*

-ec esprimas kvaliton aŭ staton

ekzemple:

honesteco — *trajto, kiu signifas, ke iu estas honesta*



hundo

revemulo — marzyciel

merlo — kos


melo — borsuk

ulmo — wiąz

velo — żagiel

uro — żubr

mulo — muł



granda pilko

-ul esprimas personon, kies econ (trajton) indikas la radiko
ekzemple:

babilulo — la homo, kiu multe babilas, bonŝanculo — la homo, kiu estas bonŝanca

scienculo — la homo, kiu ĉefe okupiĝas pri scienco. Tamen tiu ĉi vorto koncernas nur la antikvan tempon, ĉar nuntempe estas jam sciencistoj (kiuj profesie okupiĝas pri apartaj sciencoj). La sufikso — ist signifas profesion, aŭ konstantan okupon, aŭ la adeptecon al iu ideo.

Karlo: Koran dankon pro viaj klarigoj. Nun mi proponas, ke ni elektu temon por la venonta kunveno.

Barbara: Mi pensas, ke estus bone iom babili pri diversaj urboj. Mi mem volonte parolus pri nia hodiaŭa Varsovio.

Henriko: Kaj mi povus rakonti pri nia ĉefurbo de antaŭ la lasta mondmilito. Versajne neniu inter vi memoras tian Varsovion.

Barbara: Vi pravas. Tio estos por ni tre interesa. Kaj eble iu rakontos ankoraŭ pri alia urbo? Andreo, vi bone konas Hungarujon, eble vi rakontos pri Budapeŝto?

Andreo: Mi deziras, ke dum nia venonta renkontiĝo parolu nur la komencantoj, kaj ni nur helpas al ili.

Mi volus ankaŭ proponi ion alian. Krom la kutima babilado ni povus enkonduki lingvajn ludojn — skribajn aŭ parolajn.

Ekzemple oni povas formi diversajn vortojn el la literoj de unu longa vorto. Sed bonvolu memori: se iu litero en ĝi estas nur unu, oni povas uzi ĝin nur unufoje en ĉiu nova vorto.

Karlo: Donu ekzemplon, por ke ni bone komprenu.

Andreo: Jen la vorto r e v e m u l o

tre valora por spritulo.

Merlo, emo, melo

ulmo, remo, vero, revo

lumo, rulo, vero, uro

rumo, mulo, ero, muro

kaj finfine ne facile

rimarkebla eĉ veluro.

Do aperas la konkludo,

ke mirinda r e v e m u l o

en ĉi tiu gaja ludo

estas vortokolektulo

Halina: Ho, Andreo, vi estas talenta kaj ĉiam plenumora. Ni kore dankas al vi. Bona agordo ege faciligas la lernadon de la lingvo. Kaj ĝuste mi vidas, ke antaŭ momento alvenis miaj junaj anoj, la gefratoj Anna kaj Petro. Ili alportis gitaron. Tutcerte por la fino de la kunveno ni aŭskultos kanzonon. Anna kaj Petro, kion vi kantos por ni hodiaŭ?

Anna: Ni preparis la kanzonon „Ciganaj veturiloj”.

EUGENIA SZCZYGLIŃSKA

MIGRAS ĈAROJ EN KOLORA KARAVANO (Jadą wozy kolorowe)

Migras ĉaroj en kolora karavano,
Migras ĉaroj en proksimo, en lontano.
Eble, laŭ foli' aŭguros al nomadoj.
Vent' cigana viv-kompano
De l'vagado.
Ol al mi nebulo kovros vian spuron,
Nun rakontu pri cigana aventura viv'.

REFRENO: Nian vivon regas plena harmoni'
Ruĝo, verdo, bril', malbrilo, fantazi',
Grizaj nuboj kaj lazuro,
Viv-malĝojo, viv-plezuro,
Sed kolore ĉiam estas ja ĉe ni.
la, la, la...

Migras ĉaroj en kolora karavano,
Mi tre volus kun vi iri, ho cigano!
Mi angule ie loĝos ĉe l'kanzono
Kaj mi ploros ĉe l'sepult' de l'violono.
Viajn tendojn garnos mi per vent-imuno
ĉu vi faros, ke favoru la fortune min?



cikonio



pomo estas
bonĝusta

REFRENO: Ni vin dotos per la plena harmoni'
Per la ruĝo, verdo, brilo, fantazi'
Per griz-nuboj kaj lazuro,
Viv-malĝojo, viv-plezuro,
Sed kolore ĉiam estos ja ĉe ni.
La, la, la...

Kaj mi iris kun ciganoj for tra l'mondo,
Miajn harojn taŭzis, plektis vento-ondoj
Kaj mi plukis birdo-pepojn, kokerikojn
Kaj mi estis ĉe la naskoj de l'muzikoj.
Nun mi migras tra la mondo kun ciganoj
Grizajn horojn per viv-bunto talismanas mi.

REFRENO: Prenu iom el la plena harmoni'
El la ruĝo, verdo, brilo, fantazi',
El la penso-brilantoj,
El la eĥo de ĉi-kanto,
Ol ĝi iros kun cigana procesi'.
La, la, la...

Muziko: Stefan Rembowski
Pola teksto: Jerzy Ficowski
Esperanta traduko: Andrzej Pettyn

NOTOJ APUDE

Am E7 Am A7

Mi gras ĉaroj en ko-la-ra ka-ra-va - no, Mi-gras ĉaroj en pro-ksi-mo, en lo-nta-no. E-ble laŭ fo-li' aŭ-gu-ros

Dm Am Dm C F C E7 Am E7 Am E7

al no-ma-doj Vent ci-ga-na viv-ko-mpa-no De l'ra-ga-do. Ol al mi ne-bu-lo ko-vros vi-an spu-ron,

G7 Am Dm Am E7 Am Re7 Am A7

Nun ra-ko-ntu pri ci-ga-na a-ve-ntu-ra viv'. Ni-an vi-von re-gas ple-na ha-rmo-ni; Ru-ĝo,

Dm G7 C A7 Dm E7 Am F

ve-rdo, bril', mal-tri-lo, fa-nta-zi', Gri-zaj nu-boj kaj la-zu-ro, Viv-mal-ĝo-jo, viv-ple-zu-ro, Sed ko-

Dm E7 Am G7 G Dm E7 F Dm

lo-re ĉi-am e-stas ja ĉe ni. Gri-zaj nu-boj kaj la-zu-ro, Viv-mal-ĝo-jo, viv-ple-zu-ro, Sed ko-

Am H7 E7 Am Dm G7 C

lo-re ĉi-am e-stas ja ĉe ni. La la la la la la, la la la la la la, la

F H7 E7 Am Am Dm G7 C

la la la la la la la la, la la la la la la la, la la la la la la, la

F H7 E7 Am

la la la la la la la la.

tradukoj de la mickiewiczza majstroverko, trafis ne nur sub la pajlotegmentojn de la pola kamparo. Ĝi trafis ankaŭ en la bambuajn kabanojn de la vjetnama ĝangalano, en la paŝtistajn ĉaledojn de la bulgara ŝafpelanto, en iun alian foran lokon, kie imago iesa migris kun la versoj de Mickiewicz al tiu nekonata litova tero, kie „montetoj arbaraj, herbejoj verdantaj, Large apud lazura Niemen tirigantaj, al la kampoj per greno diversa pentritaj. De sekalo arĝentaj, de tritik' oritaj, Kiujn la neĝblanka poligon' ornamas, Kie per virga ruĝo trifolio flamas, Kaj ĉion zonas kvazaŭ per verda rubando, Kun malsekaj pirarboj la kampa limrando.”

Ĉu mi menci pri „La faraono”, pri „Marta”, „Quo vadis”, pri „Mazepa”, pli poste pri verkoj de Tuwim, Staff, Nalkowska, Brandys, Różewicz, kiuj — tradukite en la internacian lingvon — konatigis nian landon, nian historion, nian kulturon, la sortojn de nia nacio al homoj en la tuta mondo.

Kaj por momento ni ekpensu, kion signifas: „la tuta mondo”.

Antaŭ nelonge okazis en Varsovio la II Internacia Kongreso de Tradukistoj de la Pola Literaturo. El pli ol 20 landoj de ĉiuj kontinentoj venis tradukistoj por prezenti siajn sentojn, interŝanĝi spertojn pri la pola literaturo — de ili transdonata en sian gepatran lingvon. Inter la kongresanoj estis ankaŭ 4 poloj. La unuan fojon partoprenis la tradukistan kongreson esperantista delegacio.

Kaj kiam unu el la esperantistaj delegitoj informis la kongresanojn, ke de post la 1947 jaro ĝis la jaro 1969 aperis en Popola Pollando 141 publikaĵoj en Esperanto je la suma nombro de 600 000 ekzempleroj kaj ke inter ĉi tiuj estis 138.000 ekzempleroj de beletraj verkoj — la aplaŭdoj signifis ne nur miron pri la nombroj. Ili entenis ankaŭ ion eble multe pli valoran — rekonon.

Certe pluraj el la ĉeestantoj komencis kredi en tiu ĉi momento, ke la internacia lingvo estas plia vesto por ilia literaturo Ili komencis kompreni, ke flanke de ilia atento troviĝis unu ekscita muldujo, ĉe kiu oni okupiĝas pri la plej rava alĥemio, pri la alĥemio, kiun tiel bele nomis Jan Parandowski — pri la alĥemio de l'vorto.

JERZY GRUM

WALERIAN WŁODARCZYK

ANKORAŬFOJE: IOM PRI POLAJ E-ELDONAĴOJ

Post kiam mi transdonis pasintjare al la redakcio de „Pola Esperantisto” la manuskripton de la artikolo „Iom pri polaj E-eldonaĵoj”, presitan en la nroj 2 (pĝ. 3—5) kaj 3 (pĝ. 5—6), mi ne finis la esplorserĉadon pri niaj libroformaj eldonaĵoj. Intertempe mi sukcesis malkovri kelkajn publikaĵojn kaj korekti la bibliografion. Do, dum la 25 jaroj de Pola Popola Respubliko estis eldonitaj entute 160 publikaĵoj je la suma eldonkvanto de 640 788 ekzempleroj.* En la (nro 2) tabelo de polaj E-eldonaĵoj, publikigita jam en „PE”, laŭ la jaroj, mankis ekzemple la jaro 1946: eldonaĵoj 2, eldonkvanto 1600 ekz., kaj en pluraj jaroj estas korektindaj nombroj. Mi sukcesis intertempe enlistigi ankoraŭ 19 eldonaĵojn je la entuta eldonkvanto de 42 413 ekzempleroj.

Kiel mi jam skribis, en la eldonagado la ĉefan lokon ĝenerale okupas la lernolibroj, vortaroj kaj literaturaĵoj. Aktuale la statistiko rilate al tiuspecaj eldonaĵoj estas jena:

lernolibroj	— 11 aŭtoroj, 18 verkoj, 230 477 ekz.
vortaroj	— 9 aŭtoroj, 11 verkoj, 92 855 ekz.
literaturo	— 19 aŭtoroj, 24 verkoj, 138 872 ekz.
popularscienco	— 14 aŭtoroj, 15 verkoj, 51 880 ekz.

La leganto rimarkis certe ankaŭ la piednoton ĉe la tabelo temanta pri la eldonatingoj laŭ la jaroj, ke ĝi temis — rilate al la jaro 1969 — nur pri la unua duono de tiu ĉi jaro. Aŭtune en la pasinta jaro aperis „Mały słownik polsko-esperancki” („Malgranda vortaro pola-esperanta”) de Kazimierz Tymieński, eldonita de la ŝtata eldonejo Wiedza Powszechna, pĝ XVI + 432, eldonkvanto 10 000 + 273 ekz.

Tiun ĉi vortaron la pola esperantistaro longe atendis. Ĝia naskiĝo ja estis en la jaro 1960—1961.

La vortaro enhavas iom pli ol 25 000 da vortoj, parolturnoj kaj idiomaĵoj el la pola lingvo. Krome oni trovas en ĝi terminojn de diversaj fakoj, profesioj. La anekso konsistas el tabelo de geografiaj nomoj kaj antaŭnomoj.

Profitante la okazon, ke ankoraŭfoje mi skribas pri E-eldonaĵoj, mi aldonu tri ciferaĵojn rimarkojn. Dum la Jardudekkvino estis publikigitaj verkoj de 82 perso-

noj, kaj en tiu ĉi nombro — de 10 eksterlandanoj. Originale verkis esperantlingve 34 personoj, la tradukaĵojn faris 28 esperantistoj. Kaj fine la publikaĵojn ornamis per la kovrilpaĝoj aŭ desegnaĵoj — 31 grafikistoj.

En „Pola Esperantisto” n-ro 3 (pg 5—6) mi skribis pri nelibroformaj publikaĵoj. Por plenigi la bibliografiajn notaĵojn oni devas aldoni malsuprajn rimarkojn.

Delonge jam estas sciata, ke la esperantistoj el Vroclavo tre vigle laboras, ke la agado de la Vroclava Filio de PEA estas sukcesa. En la jaroj 1950—1952 — dank’ al iniciato kaj redaktate de Jakub Garbar — aperadis stencillite la bulteno st. „Vroclavano” (formato A-4, nombropaĝoj 14—24). Entute aperis ok numeroj je la eldonkvanto de po 500 ekz. Substrekinda ja estas la fakto, ke ĝi aperadis dum la periodo de la ĝenerala stagnado de nia movado en Pollando; tiam „Vroclavano” servis kiel la sola ligilo de la pola esperantistaro.

Menciente la artikolojn pri nia lingvo aŭ movado publikigitajn en diversaj revuoj oni devas aldoni la jenajn:

● *Od rojeń do rzeczywistości* („De ĥimeroj ĝis realo”) de d-ro Stanisław Orsini-Rosenberg „Problemy” („Problemoj”, 1965, nro 2, pĝ. 108—110),

● *Porozumienie bez kompleksów* („Interkompreniĝo sen kompleksoj”) de Bohdan Tomaszewski „Kultura” („Kulturo”) 1967, nro 1, pĝ 24),

● *Esperanto pomaga kształtować światopogląd internacjonalistyczny* („Esperanto helpas formadi la internaciisman mondkoncepton”) de Tyburcjusz Tyblewski „Oświata dla Dorosłych”, („Klerigo por la Plenkreskuloj”) 1969, nro 9, pĝ. 6563—566),

● *Esperantyzm w Polsce i na świecie* („Esperantismo en Pollando kaj en la mondo”) de Tyburcjusz Tyblewski „Oświata dla dorosłych” 1970, nr 6, pĝ.).

Apartan ĉapitron de niaj kulturaj atingoj konsistigas publikaĵoj pollingvaj, presitaj en la semajna magazino „Nowiny Jeleniogórskie” („Novaĵoj de Jelenia Góra”), kie dum la periodo 1967—1969 oni presis 17 rakontojn tradukitajn el Esperanto — ĉiuj fare de tre talenta lingvokonanto kaj filologo, mag. Tyburcjusz Tyblewski.

* En la 2 nro mi tiam statistikis: 141 publikaĵoj je la suma eldonkvanto de 598 375 ekzempleroj.

Pola gazetaro pri Esperanto

Kun ĝojo ni notas, ke en la pola gazetaro aperas ĉiam pli multe da informoj pri Esperanto kaj esperantista movado. 5 ĵurnaloj kaj revuoj aperigas konstantan Esperanto-rubrikon. Plejparte la informoj koncernas novajn E-kursojn, esperantistajn aktivecojn sur la kultura kampo, sed oni ankaŭ trovas interesojn.

Interesan informon, titolitan „Du milionoj da homoj konas la lingvon Esperanto” aperigis en sia kultura rubriko la varsovia „Trybuna Ludu” („Tribuno de la Popolo”) — organo de la Centra Komitato de la Pola Unuiĝinta Laborista Partio. Informante pri novaj esperantlingvaj eldonaĵoj, inter kiuj elstaras la „Plena Ilustrita Vortaro”, la ĵurnalo akcentas ke — ni citas — „en multaj landoj oni observas konstantan kreskon de la interesiĝo pri tiu ĉi lingvo”. „Trybuna Ludu” informas ankaŭ, ke „la unua lando, en kiu oni komencas la instruadon pere de televido estas Nederlando”.

„Okaze de la Jardudekkvino de la Esperanto-movado en Pollando, en la daŭranta Internacia Jaro de la Edukado — skribas la regiona gdanska ĵurnalo „Wieczór Wybrzeża” („Vespero de la Marbordo”) — en Gdansko oni aranĝis ekspozicion de lernolibroj kaj vortaroj de Esperanto en la pola kaj aliaj lingvoj, inter kiuj vera raraĵo por la libroŝatantoj estas la unua lernolibro de Esperanto, eldonita en la 1887 jaro en Varsovio, en la franca versio”.

La regiona ĵurnalo „Dziennik Wieczorny” („Vespera Ĵurnalo”), aperanta en Bydgoszcz, informas, ke dum preskonferenco koncerne Esperanton, okazinta en Gdansko, „asistanto de la Katedro pri la Pola Lingvo de la Gdanska Universitato, doktorino Jadwiga Kotarska, sciigis ia., ke — laŭ decido de la rektoro — oni enkondukis en tiu ĉi altlernejo lektoraton de Esperanto.”

Pri lektoratoj de Esperanto en la Universitato je la nomo de Nikolao Kopernik en Toruń kaj en la tiea Instruista Studumo informas ankaŭ alia loka ĵurnalo. Ĝi akcentas, ke malgraŭ tio, ke ĉiujare pluraj studentoj fariĝas diplomitaj Esperanto-instruistoj, plue mankas kursgvidantoj, ĉar la interesiĝo pri E-o konstante kreskas. Ni ekscias, ke dezirante forigi ĉi tiun mankon la Filio de la Pola Esperanto-Asocio en Toruń, kunlabore kun la loka Asocio de la Pola Instruistaro, decidis aranĝi apartan E-kurson por instruistoj laborantaj en lernejoj, kiuj sekve ekreginte la lingvon povus ĝin instrui en siaj lernejoj.

Pri tute alia Esperanto-temo, en ampleksa artikolo, titolita „SP4 ekligas kontakton”, skribas la ĵurnalo „Żołnierz Wolności” („Soldato de Libereco”), la ĉefa armea ĵurnalo aperanta en Varsovio. Temas pri la klubo de kurtondistoj ĉe la Vojevodio Nacia Konsilantaro en Bjalistoko. „La jaro 1970 — ni legas en la ĵurnalo — estas apartsignifa por tiu ĉi klubo. Jen pli malpli antaŭ tri jaroj, laŭ iniciato de bjalistokaj kurtondistoj kaj de la Pola Esperanto-Asocio, oni decidis omaĝi per diplomo la 50-an datrevenon de la morto de Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto. La patronecon super tiu ĉi fierinda iniciato prenis la kurtondista klubo ĉe la Vojevodio Nacia Konsilantaro, kaj tutaparte okupiĝis pri tiu ĉi afero unu el la plej aktivaj membroj de la klubo, Bogumił Cechmistro.

La diplomon oni starigis — ni legas en „Żołnierz Wolności” — por omaĝi la memoron de Ludoviko Zamenhof kaj propagandi Esperanton, kaj ĝi estas destinita por ĉiuj kurtondistoj en la tuta mondo — pro la ekligado de radiokontaktoj kun Bjalistoko, la naskiĝurbo de tiu ĉi granda homo.

Aktuale, kiam la plejmulto de la diplomoj formigris jam en la kvar flankojn de la mondo (la konkurso funkcios nur ĝis la 31 de decembro 1971) — oni povas konstati — skribas la ĵurnalo — ke la iniciato de la bjalistokaj kurtondistoj ĝuis grandan popularecon kaj ke la celo estas atingita.

„La reĝo de futbalo pri Esperanto” — tekstas la titolo de ampleksa informo aperinta en la ĉefa pola sporta gazeto „Przegląd Sportowy” („Sporta Trarigardo”). La revuo citas eldirojn pri Esperanto fare de la du plej famaj futbalistoj de la lasta piedpilka mondĉampionkonkurso — Pelé kaj Carlos Alberto, kaj aludas la lingvajn barierojn, kiuj ofte malfaciligas la senperajn kontaktojn de la sportistoj. „Esperanto — oni citas la eldiron de Pelé — estos tre utila por la sportistoj ĝenerale, proksimigos ilin kaj faciligos la amikajn kaj sportajn kontaktojn. „Przegląd Sportowy” informas samtempe siajn legantojn pri speciala koresponda kurso de la internacia lingvo por sportistoj, kiun aranĝas nun la Ĉefa Estraro de la Pola Esperanto-Asocio.

Prilaboris A. PETTYN

Eksterlandajn gekorespondantojn ni sérĉas por polaj gekursanoj de II kaj III grado de la internacia lingvo

POLA ESPERANTISTO — dumonata organo de la Pola Esperanto-Asocio. Adreso de la administracio kaj redakcio: Varsovio, Jasna 6, Polando. Redakcia Komitato: Jerzy Grum, Jan Klimek, Lech Kosieniak, Wiesław Tomaszewski (redaktoro), Jerzy Uśpieński. Teknika redaktoro: Joanna Duchnowska. Abonkosto en la okcidentaj valutoj por la tuta jaro (inkluzive la afrankon) — por Eŭropo, Afriko kaj Azio: 1,60 dol.; por Usono kaj Kanado: 2,20 dol.; por Aŭstralio kaj Nov-Zelando: 0,15.3 ang. p. — aŭ egalvaloro en okcidentaj valutoj. La monon oni sendu al — Warszawa, str. Warecka 10, NBP — XII, O/M NR 1534-6-71 menciante la celon de la enpago. Prezo por unu numero 2 rpk.

POLA ESPERANTISTO (Esperantysta Polski) — dwumiesięcznik Polskiego Związku Esperantystów; Warszawa, Jasna 6 (tel. 27-82-67). Prenumeratę na kraj przyjmują urzędy pocztowe, listonosze oraz Oddziały i Delegatury „Ruchu”. Można również dokonywać wpłat na konto PKO Nr 1-6-100020 — Centrala Kolportażu Prasy i Wydawnictw „Ruch”, W-wa, Towarowa 28. Prenumeraty przyjmuje się do 15 dnia miesiąca poprzedzającego okres prenumeraty. Cena prenumeraty rocznej — 36.— zł. Prenumeratę na zagranicę, w wysokości 50,40 zł rocznie, przyjmuje Biuro Kolportażu Wydawnictw Zagranicznych „Ruch”, Warszawa, Towarowa 28, tel. 20-46-88, konto PKO Nr 1-6-100024.

KONSTANTY ILDEFONS GAŁCZYŃSKI

Varsovio



*Se navigus vi mare,
Tere migrus jarjare,
iuloke vin kaptus
la ravo!
Ĝi vin signos permane
Vi 'ekĝojos infane
Kaj songreve vi vokos:
Varŝavo!*

*Se aperos, ho frato,
Luno ĉe Marjenŝtato,
De l'folioj ekbrilos
or-flavo —
Vent' ekblovos noktsterne
Vi plenkore, eterne,
Enamiĝos al ĉarm' de
Varŝavo!*

*Ho, sanktejo de l'poloj,
De la venk' la simbolo,
Famiĝinta pro homa
la bravo —
Niaj pensoj kaj koroj,
per senlima adoro,
Vin omaĝas, mirinda
Varŝavo!*

Tradukis Andrzej Pettyn

